

si la publikon. Pensante pri la unuaj jaroj de AIS-ekzisto kaj aktiveco en San Marino: tiam estis pendigitaj – en la tuta sanmarina regurbo – multaj grandegaj afiŝoj, kies anonco de la koncerna studsesio finis ĉiam kun itallingva invito por partopreno de la publiko "*La cittadinanza e invitata*"...

Kiel anoncite sur la dorsflanka kovrilpaĝo de Scienca Revuo n-ro 194 (SR 3/2003) la ISAEanoj kaj legantoj de Scienca Revuo (kiuj partoprenis la ĉi-jaran AIS-an studsesion en ties naskiĝloko) estis invititaj, renkontiĝi la 3-an de septembro je Esperanto-kasteleto en la urbeto *Tavoleto*, ĉ. 25 km sude de Sanmarino, por komune diskuti kiel, kiam kaj kie oni festu la ekaperon de la unua scienca revuo antaŭ cent jaroj (en 1904), kaj ankaŭ pridiskuti la baldaŭan centjariĝon de nia asocio mem. Tre taŭga ŝajnas eldono de festlibro kaj aranĝo de jubilea ISAE-konferenco post aŭ antaŭ la 92-a UK en 2007 okazonta en Florenco.

Mi kore dankas al la 24 vizitantoj ĉe Esperanto-kasteleto (kiuj prenis sur si la streĉiĝon de longa alveturo de Riminio ĝis Tavoleto) por la valoraj sugestoj kaj por la promesita subteno cele al la eldono de ISAE-festlibro.

R. Sachs (DE)

17-a Studadsesio de Hercberga Esperanto-Centro

Se por esperantlingva studsesio estas ofertata la tapiŝornamita urbdoma kunsid-salono (necesis zorge purigi la ŝuojn antaŭ ol eniri!) kaj se la urbestro mem salut-alparolas la ĉeestantojn, nu, poste oni ne plu mirigas, ke ankaŭ bakisto, vendejstoj, komercistoj, hotelestro – do, preskaŭ la tuta urbo – scias pri la denova Esperanto-renkontiĝo en *Herzberg am Harz* / Germanio, de la 12-a ĝis 14-a de decembro 2003.

Trideko (dum la sabatvespera *Zamenhof*-festo kun disdono de Sankta Nikolao-surprizonacoj kaj certifikatoj pri sukcese plenumitaj ekzamenoj de antaŭaj studsesioj – tiuj lastaj estis disdonitaj ne de S-ta Nikolao sed de la prezidanto de GEA – eĉ kvardeko) da homoj estis venintaj por partopreni la Hercbergan 17-an studsesion kaj por viziti la nove fonditan Esperanto-Arĥivon kaj Interkulturan Muzeon "Esperanto kaj aliaj lingvoj".

Nelacigeble informis *Peter Zilvar* pri studado kaj la planitaj programoj de estonta baz- kaj pluklerigado kadre de la Hercberga "Oficiala Esperanto-Centro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA)", kaj suverene enkondukis la prelegojn pri "reklamo kaj varbado", pri Esperantolando, pri la baldaŭa ISAE-centjariĝo kaj pri la irlanda lingvo en la Eŭropa lingvoĥaoso. Specialan intereson trovis la temo "kiel mem fari hejmpaĝon" kun grup-laboro antaŭ 4 komputiloj – eĉ post oficiala fermo de la studadsesio oni ne volis forlasi la praktikajn demonstraciojn fare de la junaj komputilspertaj kaj entuziasmaj docentoj. Valoras denove viziti la lern- kaj pluklerigeblojn kadre de Hercberga Esperanto-Centro.

Christine Sachs (DE)

Legantoleteroj



Kio estas geodezio?

Geodezio estas scienco, kiu difinas la formon kaj dimension de nia terglobo. Tiamaniere povas aspekti respondo de sciencisto. Laŭ la nova PIV "geodezio estas la scienco pri la formo, grandeco kaj gravito de la Tero aŭ de sufiĉe granda parto de ĝi, por ke estu necese konsideri ĝian kurbecon". Kaj geodeziistoj estas "specialistoj en tiu scienco".

Populare dirite geodeziistoj estas tiuj homoj, kiuj fabrikas mapojn. Jam en la fora pasinteco homoj volis ekkoni la grandecon de siaj domo, ĝardeno, kampo, vilaĝo, urbo, regiono, lando kaj la tuta Tero. Tial sinsekve estiĝis unue **desegnitaj mapoj** de konataj lokoj, pli poste la **mezuritaj mapoj**. Nuntempe vi povas renkonti mapojn en diversaj sferoj de la homa agado. Ĉu vi volas konstrui domon, fervojon, akvokondukilon aŭ tunelon – ankaŭ vi bezonas mapojn por trovi la ĝustan vojon al via celo. Eĉ registaraj oficistoj bezonas mapojn de sia lando aŭ distrikto.

Unu el niaj plej ŝatataj infanlibroj certe estis iu geografia atlaso, plena de belaj, koloraj mapoj. Ĝi forportis nin al nekonataj landoj, kie vivis herooj de niaj tiam legataj aventurplenaj libroj...

Sed ni revenu al la nocio "geodezio". Ĝi dividiĝas al la t.n.

– "geodezio ebenaĵa aŭ praktika", kiu solvas kutimajn detalajn postulojn en ebena, kaj la

– "geodezio supra", kiu solvas taskojn sur globo aŭ elipsoido. La ĝusta solvado de ĉiuj tiuj taskoj baziĝas en perfekta kono de matematiko kaj ekvilibriga kalkulado.

Problemon kiel ĝuste desegni mapon de la kurbigita tera surfaco al ebena solvas la **matematika projekciado**. Kaj, fine, la problemojn de kvalitaj koloroj kaj bona legebleco solvas la **kartografio**. Dum terena mezurado oni kutime dividas la terenon al unuopaj punktoj, kiuj formas la framon de estonta mapo.

Baza geodezia tasko estas difini reciprokan pozicion de unuopaj punktoj de la Tera surfaco. Temas pri **spaca tasko**, ĉar la punktoj ne troviĝas en ebena sed sur la malebena tersurfaco. Tial, por difini la pozicion, ni bezonas **3 spacajn koordinatojn**. Por simpligi la taskon oni evoluigis unue **pozician mezuradon**, kiu estas ĝis nun praktikata en la **katastra mezurado** (temas pri posedaĵo de terpecoj – parceloj). La supermaran alton oni difinis per **nivelado**. Tio estas simpla metodo por kompari la altecon de proksimaj punktoj.

Certe vi jam ie vidis ter-mezuriston kun mezurlato. Hodiaŭ oni evoluigis sufiĉe precizan metodon de samtempa mezurado de situo kaj alto per elektro-optika distancmezurilo. Ĝi grave simpligas kaj plirapidigas terenajn mezuradojn. Aperis ankaŭ metodo de mezurado laŭ artaj satelitoj (GPS).

Karel VOTOCEK
Manesova 637
CZ 411-08 Steti
Ĉeĥa Respubliko – ĈEĤIO
< Karel.Votocek@seznam.cz >

Ĉu mi povas enkonduki novan rubrikon en SR –

eble "naivulo demandas" aŭ simile?

Intertempe: "Nescianto-nekomprenanto demandas la sciantojn":

1. Ĉu la praknalo estis nigra-trua eksplodo? Kiel ĝi atingis eksplodstadion? Ĉu la konataj (kiom? kie?) truoj povus simile krei "universojn" → multiversojn? Kiel tio rilatas kun la ideo de la enspiranta-elspiranta Braĥmo?

2. Ĉu transiron de materio en energion mi pensu laŭ-vorte aŭ kiel okazantan en tia rapideco, ke ĝis nun ne eblas ĝin mezuri, t.e. ke materio restas materio, sed ke en tiu fazo ĝi pro rapideco fariĝas ne-mezurebla?

3. Aŭ ĉu miajn demandojn inspiras konservemo kaj ili spegulas nur et-homan psiĥan bezonon pri certeco?

Rob MOERBEEK
Zwaansmeerstraat 48
NL – 1946 AE Beverwyk
Nederlando

Pres-indikajoj : ISSN 0048-9557, Eldonanto: ISAE

Laserkopiita : Decembro 2003 ĉe Copy & Co, Eschwege/Germanio

Responso redakta teamo : La estraro de ISAE

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare

pagebla al

a) landa peranto (resp. landa delegito), aŭ al

b) ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): isae-z, aŭ al

c) Poŝtbanka konto (nome de ISAE-SACHS)

IBAN: DE76 5001 0060 0140 3806 08

BIC: PBNKDEFF

ĉe Postbank Frankfurt/Main, Germanio, Banka kodo 500 100 60

Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	Libroservo AEA <Libroservo@ans.com.au> 143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.
Brazilo	Brazila Esperanto Ligo (BEL) C.P. 03625 BEL BR 70084-970 Brasilia
Britio	S-ro Paul Hewitt <paul@esperanto.freemove.co.uk> 26, Highfield Rd., North Thoresby Grimsby, N.E. Links, GB – DN36 5RT
Finnlando	S-ino Heta Kesälä <heta.kesala@pp.inet.fi> Kalamihenkäya 3 D 32, FI-4300 Tuusula
Francio	S-ro Charles Trébouet <trebouet.bohere@compagnet.fr> Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil
Irlando	S-ino Joy Davies 9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W
Korea Resp.	S-ro Cho Sung Ho <shcho@inha.ac.kr> Biol.Fak.Inha Univ., KR Incheon 402-751
Norvegio	Eldonejo Esperanto <hara-ryg@online.no> Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo
Pollando	S-ino Maria Majerczak ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków
Svedio	S-ino Lisbeth Andreasson <bertil.andreasson@horby.mail.telia.com> Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby
Usono	Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA) <elna@esperanto-us.org> P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA

Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) aŭ c) la eldonanton kun indiko de la kompleta poŝtadreso al kiu estu sendata Scienca Revuo:
Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio
Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <IsaeSachs@aol.com>